

Pola Esperantisto

Esperantysta Polski

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
WYDAWCY: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTANTOJ

XXVII JARO
NR. 10.

Redakcio kaj Administracio
Abonprezoj ktp. vidu ĉe fino de 1^a tekstoparto.

OKTOBRO
1933.

POST KONGRESO... ANTAŬ KONGRESO...

La decidoj de la Kolonja kongreso celantaj unuecigi nian movadon, simpligi ĝian organizon, estas treege gravaj kaj eble ili komencos novan periodon en historio de nia neŭtrala movado. La nova organizaĵo jam baldaŭ ekfunkcios. La 1-an de novembro ĝi ekkomencos sian agadon — dum ni atendas ĝiajn instrukciojn. Ke ili alportu rapidan atingon de 1^a celo!



Parto da niaj samideanoj jam scias pri tio, ke la venontjara kongreso okazos en Stockholm. Tiu sciigo estas al ni speciale ĝojiga. Ĝi permesas al ni esperi, ke partopreno de polaj samideanoj estos tre multnombra. Altiros ilin al Stockholm ne nur simpatio al la lando kaj al ĝiaj loĝantoj, sed ankaŭ favoraj kondiĉoj, kiujn estigas ĝia najbareco.

Pollanda Esperanto-Delegitaro jam entreprenis klopodojn por funkcii el nia haveno en Gdynia al Stockholm specialan ŝipon, kiu samtempe servos al la kongresanoj kiel hotelo.

Tiu ekskurso estos treege malmulte kosta. Krom tio partoprenantoj ricevos rabatojn ĉe polaj fervojbiletoj. La plej grava kaj profita estas tio, ke tiu ekskurso estos tute libera de pasportoj kaj vizoj.

Kiel sciante, dum la kongreso en Warszawa oni akceptis inviton de samideanoj en Gdynia por okazigi tie en 1934 j. nian landan kongreson. La tasko de la aranĝantoj estos iel konkordigi tiujn du aferojn por ilia komuna profito.

Espereble en la plej proksima n-ro de P. E. sekvos pluaj novaĵoj ĉi-rilate.

N I O R G A N I Z U N I N !

Kun vera ĝojo ĉiu Esperantisto eksciis pri la interkonsento atingita en Kolonjo inter la Esperantaj organizaĵoj. Fine tiu unusola Esperanta organizaĵo, la nova UEA, al kiu apartenos ĉiu Esperantisto aliĝinta al iu ajn Esperanta grupo!

Sed tre rapide okupas nin duboj: ĉu la movado laŭ la nova ŝtupigo membro - grupo - landorganizaĵo - UEA ankaŭ bone funkcios? Ĉu tiu longa vojo de membro ĝis UEA ne kaŝas en si gravajn danĝerojn?

Jes, tute certe, tiuj danĝeroj povas ekesti. Ili povas esti: grupo kaj landa organizaĵo.

Pri la grupo kiel peranto mi ne volas paroli pli detale, ĉar mi kredas, ke pri bona administrado kaj transsendado de membrokotizoj de la grupoj al la landa organizaĵo decidis tiu lasta: se la landa organizaĵo laboros vigle kaj sisteme, ĝi ankaŭ scios eltiri la kotizojn el la grupoj.

Sed iom pli detale mi dezirus paroli pri la dua, pli grava peranto: la landa organizaĵo. Mi demandas: ĉu niaj Esperantaj naciaj societoj laboras vigle, sisteme, plenorde? Kaj antaŭ ĉio ni rigardu en nian propran korton: ĉu nia PED laboras modele?

Al supra demando ni ne rajtas respondi antaŭ ol ni ne cias, kion entute oni devas postuli de landa organizaĵo. Se ni iom pripensas, ankaŭ iom komparas la laboron de la diversaj naciaj societoj, ni venas al la konkludo, ke la taskoj de tia modela organizaĵo estas vere multaj, ĉiuokaze pli multaj ol oni kutime supozas. Certe estos bone, se ni foje precize esploros la necesan agadon de landa organizaĵo. Ĉi sube mi provos skizi tian agadon — tiel kiel mi ĝin komprenas.

Ekzistas kvar ĉefaj laborkampoj de landa organizo. La unuan ni nomu:

I. Interna organizo kaj financoj. Ĉi tiu punkto en nuna tempo estas la plej grava. Ĉi tiu fako kreas kvazaŭ la bazon por ĉiu plua laboro (kaj por la sekvantaj 3 laborkampoj). Al interna organizo apartenas ne nur la varbado de grupoj al la landa organizaĵo kaj la enkasigado de monoj, sed ankaŭ la konstanta ĉikoncerna kontakto kun la grupoj. Krome ĉi tiu fako helpas fondi Esperantajn grupojn en urboj, kie ili ne ekzistas aŭ dormas. Ĝi devas esti en konstanta kontakto kun ĉiuj izoluloj kaj altiri ilin al landa organizaĵo. Ĝi devas bonege koni la tutan situacion en la lando. Adresaro tre preciza kaj aktuala de grupoj, estraroj, gvidantoj kaj izoluloj estas nepre necesa.

Ĉi tiu unua fako estas eksterordinare grava. De ĝia sukcesa laboro dependas la sorto de la tuta organizaĵo. La fako devas scii organizi kaj aligi ĉiujn Esperantajn fortojn, kaj se ĝi ne sukcesos aligi ilin, ĝi devas almenaŭ resti kun ili en kontakto.

La grupoj aliĝos al la organizaĵo nur, se ili havos ian profiton pro tiu aliĝo. Jen ni venas al la dua laborkampo de landa organizo:

II. Kontakto kun la grupoj (kaj kun izoluloj kaj aliaj landaj Esperantaj institucioj). Ĉi tiu fako kontaktas kun grupoj aŭ izoluloj ne por ilin organizi, sed por helpi al ili aŭ laborigi ilin. La landa organizaĵo devas ludi la rolon de patrino por la grupoj. En tiu rolo ĝi devas ĉiam zorgi por siaj infanoj. Ĝi helpas al la grupoj en ĉiuj propagandaj aferoj: ĝi liveras propagandmaterialon, propagandparoladojn, eĉ prelegistojn, ĝi aranĝas prelegvojaĝojn de eksterlandaj Esperantistoj, ĝi eventuale venigas eksterlandajn Ĉe-instruistojn (se tion ne prizorgas la koncerna landa Esperanto-Instituto), ĝi prizorgas kaj vendas Esperantaĵojn (pinglojn, glumarkojn ktp.), lernolibrojn, literaturon. Grava ankaŭ estas la helpo por la grupa vivo. La fako devas liveri kaj interŝanĝi taŭgan materialon por grupaj vesperoj, ĝi devas krei eĉ tutan ĉi koncernan arhivon kaj helpi, speciale al la malpli grandaj grupoj. Ĉiam kaj ĉie ĝi devas helpi per konsilo. Ne estas eble, citi ĉiujn detalojn kaj ĉiujn eblecojn tiurilatajn. Al ĉi tiu fako apartenas ankaŭ la laborigo de la grupoj, do jen ekzemple tiaj projektoj kiel la en Polujo komencata plebiscito. Detalaj instrukcioj, daŭra informado pri ĝisnuna stato de la laboro, individuaj konsiloj sukcesigos simile grandan projekton. Ĉi tie mi citu ankaŭ la laboron de grupoj kaj izoluloj en naciaj redakcioj, en Radiostacioj, en sferoj ne-Esperantaj — ĉio sub la sperta gvidado kaj konstanta helpado de landa organizaĵo. Ankaŭ literatura kaj ĵurnalista laboro sub gvidado de la landa organizaĵo estas grava (ekz. kreo de pola antologio — tiel kiel nun per helpo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

la ĉeĥoslovakoj laboras pri sia antologio). — Ĉi tiu fako ankaŭ havas la devon esti en konstanta kontakto kun gravaj samlandaj Esperantaj entreprenoj. Ekz. en Polujo ĝi devus kontakti kun la pola Esperanto - Instituto, kun la fondiĝinta gazetservo (ankaŭ kun la samideanoj laborantaj en PAT!) kun la Radio-Servo, kun la adresaro - entrepreno de Zawada, kun la Esperantaj gruparoj, Pola Esperanto-Asocio, Laboro kaj aliaj. Ĝi devas ne nur kontakti, sed ankaŭ certagrade influi, helpi, instigi.

Ni vidas, ke la taskoj, de tiu dua fako estas tre diversaj. Tamen ili ĉiuj kondukas al unu celo: viviĝi la enlandan movadon kaj krei el ĝi unu tutajan laborantan laŭ komuna plano en difinita direkto.

La tria laborkampo de landa organizo kvazaŭ kompletigas la laboron de grupoj kaj izoluloj. Ĝi nomiĝas:

III. Kontakto kun la publiko (ne-Esperanta). Ĝi estas la senpera kontaktado de landa organizaĵo (kvazaŭ de la Esperanto-centrejo) kun la publiko en la tuta lando. La fako realigas memstaran propagandon por Esperanto — sen helpo de la Esperantistoj. Antaŭ ĉio ĝi kreas propagandmaterialon, do flugfoliojn, poŝtkartojn, glumarkojn, afiŝojn, eble broŝurojn k. a. Ĝi zorgas, ke tiu materialo atingu la publikon. Ĝi vendas ĉiujn haveblajn lernolibrojn kaj vortarojn, disponigas al la publiko informservon pri Esperantaj aferoj (laŭbezone ankaŭ tradukservon). Tutlandaj kursoj, ĉu per korespondado (skribaj kursoj), ĉu per gazetaro, ĉu Radio, ĉu alie — same estas grava tasko de tiu fako. Ne laste ankaŭ la gazetservo (se tia kontentige laboranta organizaĵo ne ekzistas en la lando). Devas esti parto de landa organizaĵo.

Kaj nun ni venas al la lasta fako, kiu kronas la tri aliajn. Ĝi estas la:

IV. Kontakto kun oficialaj rondoj. Ĉi tiu fako faras la „grandan politikon“. Konstantaj memorskriboj al publikaj asocioj, institucioj, partioj kaj antaŭ ĉio ministerioj estas la ĉefa laboro. Ĝia tasko estas ĉiam denove aperi en oficialaj rondoj, kie oni devas senti, ke la Esperantistoj vivas. Plua tasko: rilatado al UEA kaj al alilandaj Esperantaj institucioj. Fine apartenas al tiu ĉi fako la reprezentado de la organizaĵo.

Mi kredas, ke en tiuj 4 fakoj oni povas retrovi la tutan necesan agadkampon por landa organizaĵo. Kompreneble, ofte estas malfacile difini, al kiu fako apartenas tiu aŭ alia projekto, ofte ankaŭ iu problemo okupas samtempe 2 aŭ 3 fakojn. Sed tio ja esence ne malhelpas.

Ni nun konas proksimume la taskojn de landa organizaĵo kaj ni povas reveni al la antaŭa demando: Ĉu nia PED laboras modele? Mi kredas, ke eĉ plene rekonante la klopodojn de PED ni — volante esti sinceraj — devas respondi, ke la ĝisnuna laboro de PED estas malproksima de laboro farenda de modela organizaĵo. Kaj mi ankaŭ ne dubas, ke la PED estraro mem konscias pri tio kaj ne neos nian aserton. Do ni serĉu la kaŭzojn, kial PED ne laboras modele.

Ne konante bone la ĉirkonstancojn (lokajn) en Krakovo eble mi ne scias prijuĝi precize tiujn kaŭzojn. Tamen oni permesu al mi eldiri mian opinion, kiu estos la opinio de elprovinca observanto. Kaj certe ĝi ne estos tro malproksima de la realeco.

La ĝisnunan agadon de PED karakterizas tri mankoj: manko de plano, manko de laborfortoj kaj manko de mono. Mi tuj aldonas, ke PED certe havas kaj planon kaj laborfortojn kaj monon, sed ili estas nepre nesufiĉaj.

Mankas agadplano kaj mankas la sistemeco. Ekzemplo: la plebiscito. Ĉu ĝi estas gvidata laŭ plano? Dum Lublina kongreso pluraj samideanoj esprimis sian ĉi-koncernan fortan kritikon. I. a. oni demandis, kiom da voĉoj PED esperas kolekti, kion PED intencas fari per la kolektita materialo, kion ĝi esperas antigi. Pasis jaro kaj tiuj demandoj restis sen respondo. Dum la sama kongreso s-ano inĝ. Loth el Łódź atentigis, ke ĉiu sistema laboro bazas sur 4 faktoroj: analizo, plano, realigo kaj kontrolo. Li asertis, ke oni alpaŝis al realigo sen plano, bazante sur nura analizo kaj neniel atentante la kontrolon, kaj li avertis kontraŭ malsukcesoj. — El tiu kaj aliaj ekzemploj mi konkludas, ke fakte mankas agadplano kaj ke PED verŝajne ne starigas por si certajn atingendajn celojn nek fiksas la procedon de ilia atingo.

Mankas laborfortoj. Ekzemplo: PED ofte ne respondas al skribaĵoj de la samideanoj. Mi aŭdis multajn tiurilatajn plendojn de diversurbaj samideanoj, ankaŭ mem mi tion spertis. Sed estas ja la plej elementa principo por ĝusta funkciado de landa organizaĵo, ke ĝi ne nur nepre respondu al demandoj kaj

skribaĵoj, sed eĉ mem estu la instiganto, mem demandu, helpu, admonu. Do la nombro de elirantaj poŝtaĵoj de PED devus superi la enirantan poŝtaron.

Mi ne volas ĉi tie kritiki aŭ eĉ ataki niajn samideanojn, kiuj de longa tempo gvidas la administradon de PED kaj al kiuj mi persone sentas altan estimon pro ilia ĝisnuna laboro. Sed ni rigardu sobre! Estas momento, kiun ni eble ne sufiĉe atentis en niaj rondoj. Oni elektas al estraroj aŭ aliaj oficoj speciale la longjarajn, bonmeritajn Esperantistojn, ĉar per tio oni volas kvazaŭ honorigi ilin kaj rekoni ilian longjaran fidelecon al nia movado. Komprenoble oni ankaŭ kredas je ilia pli granda lingva kaj organiza scipovo. Oni tamen forgesas, ke ĝuste tiuj malnovaj samideanoj ofte jam estas lacaj de longjara laboro. Tiu „laciĝo“ (post streĉoplenaj laborjaroj) estas konata fenomeno en nia movado kaj konsiderante ĝin ni konsekvente devus anstataŭ ŝargigi la malnovajn samideanojn malŝargigi ilin, almenaŭ de t r o a laboro. Taŭga certe (estus kompromiso: reteni kiel organizantojn la malnovajn pionirojn kaj altiri kiel laborantojn la freŝajn Esperantistojn. Oni elprofitu la junan entuziasmon kaj ofte laboremon, kiujn ni trovas ĉe Esperantistoj en iliaj unuaj jaroj post Esperantistiĝo. Kaj revenante al nia temo: ankaŭ PED reorganizu en supra senco sian kunlaborantaron.

Oni permesu al mi, aldoni ĉi tie ankoraŭ kelkajn vortojn pri la laboro kaj ĝia divido. Unuecajn regulojn pri labordivido oni komprenoble ne povas starigi por ĉiuj landaj organizaĵoj. Multo dependas de la cirkonstancoj. Eble estus bone, se oni trovas 4 spertajn (do eble malnovajn) samideanojn, el kiuj ĉiu gvidus unu el la supre cititaj „fakoj“. Ili kune kun la prezidanto kreus 5-personan estraron de la organizaĵo. Krome ili altirus el la freŝaj Esperantistoj subsekretariojn kaj eventuale pluajn helpantojn. Tiel la oficejaj laboroj, kiuj estas la plej urgaj kaj plej elementaj, kuŝus en la manoj de la junaj (ni esperu plej laboremaj) samideanoj. Sufiĉus du subsekretarioj: unu por la parencaj fakoj I—II, dua por la fakoj III—IV. Se tamen oni ne povus trovi la 4 spertajn kaj laboremajn malnovajn samideanojn, estus bone trovi el la malnovaj samideanoj, unu energian ĝeneralan sekretarion, kiu gvidus la oficejon kun helpo de juna forto (aŭ junaj fortoj) kaj kiu havus la rajton memstare gvidi la aferojn de la organizaĵo — laŭ certa antaŭe fiksita plano. Grave estas, ke la landa organizaĵo, se iel eble, pagu la laborojn de unu subsekretario. Por estonto ĝi eĉ klopodu ne nur pagi la sekretarion pohore, sed eĉ dungi lin por tuttaga laboro. En la sama momento, kiam ni havos pagatan oficiston, la akurata laboro de la organizaĵo — ĝis certa grado — estas garantiita. La subsekretario (aŭ subsekretariojn) helpas eventualaj helpantoj (ekz. multobligisto, librotenisto ktp.). La oficeja laborantaro devas ofici almenaŭ dufoje en la semajno, la subsekretario eĉ pli ofte (kiel oficejo sufiĉas privata hejmo).

Mi supre preparolis detale la organizon de la oficeja laboro. Oni ne pensu, ke ĉiujn detalojn laŭ supra modelo mi opinias la sole ĝustaj. Mi nur deziris elmontri, ke ankaŭ la oficejo devas esti bone organizata, por povi digesti multan laboron.

Kaj nun ni venas al la lasta manko de PED: manko de mono. PED laboras per ridinte malgrandaj sumoj (pojare eble per 100—200 zloty. Ni konas tiujn ciferojn el la raporto. PED plendas pri tio, ke la grupoj ne aliĝas aŭ ne pagas la kotizojn kaj tiel paralizas ĉian laboron. Sendube PED pravas. Aliflanke mi kredas, ke ĉe streĉa laboro PED ne nur aligos ĉiujn grandajn grupojn en Polujo, sed ankaŭ pagigos ilin. — Sed entute: kiom da mono reorganizita PED bezonas? Laŭ mia propono la buĝeto bezonas ĉ. 470.— zloty pojare nome 200.— zł. por poŝtafranko (t. e. po 20 zł. por 10 monatoj), 200.— zł. por oficisto-subsekretario (po 20 zł. por 10 monatoj, kalkulante por laborhoru maksimume 1.— zł) kaj 70.— zł. por leterpapero, oficejaj bezonaĵoj kaj aliaj. La jaron mi kalkulas kun 10 monatoj. Dum julio-aŭgusto ordinare la laboro malgrandiĝas je minimumo. Kaj nun la enspezoj. Laŭ singarda kalkulo PED povas atingi ĉe streĉa laboro la enkasigon de 500 ordinaraj membrokotizoj po 0.60 zł. pojare (krom la UEA-kotizoj). Tio donus 300.— zł. La reston de 170.— zł. oni devus gajni per aliaj rimedoj, do ekz. per izolaj membroj (ne apartenantaj al grupoj) pagantaj pojare 2 aŭ 3 zł, per nacia kongreso, per monkolekto, per eventuala gajno el vendado de Esperantaĵoj. Plej reale estus, se oni en Polujo (kiel en multaj aliaj landoj) kreus „patronojn“ de nia movado, kiuj libervole pagus jarkotizon de minimume 10.— zł. Mi kredas, ke oni trovas — en la komenco — 10—14 tiajn patronojn (personojn aŭ grupojn). Mi aldonas, ke en aliaj landoj ekzistas ofte multaj dekoj da tiaj patronoj. Tiel, mi kredas, PED povus trovi la ekvilibron de la buĝeto. Tiu vere tre modesta buĝeto ne permesas grandajn eksperimentojn. Eĉ por eventuala eldono de iaj propagandiloj oni

devus serĉi aliajn fontojn, eble privatatan monprunton. Sed por la komenco tiu malgranda buĝeto devas sufiĉi. Post la unua jaro — ni esperu ĝin — prigrandiĝos antaŭ ĉio la membrokotizoj. Tiam PED povos spiri jam iom pli libere. Kaj post du-tri jaroj PED eble jam povos dungi sian profesion oficiston.

La loko ne permesas por citi ankoraŭ multajn detalojn. Mi provis skizi planon, kia devus esti nia PED. Eble ne ĉiu konsentas kun mia „programo“. Certe en tiu aŭ alia punkto mi eraras. Se tamen mia modesta artikolo iel helpos al plibonigo de PED, mi estos plene kontenta.

Ni havas fine la unuecigitan Esperanto-movadon, ni havas la unusolan UEA. Nun estas nia vico firmigi tiun organizaĵon per ĉiuj niaj fortoj. Ni devas nepre zorgi, ke nia landa organizaĵo estu bonege laboranta parto en tiu ĉeno „membro-grupo-landorganizaĵo-UEA“. Se pri tio ni ne zorgos, ni grave pekos kontraŭ nia movado: ni malhelpos ĝian disvolviĝon. Ĉu tion ni deziras?

Edmund Fethke.

LA EĤOJ.

Romans. Malgranda urbo en la departamento Drôme, en Francujo. Malnova horloĝturo. Mallarĝaj stratetoj, el kiuj ŝajnas blovi la vento de pasinteco. Granda ŝu-industrio.

Tion ĉi povus diri pri Romans gvidlibroj.

Mi tamen venis tien ne kiel turistino. Mi venis, por semi en tiun grundon la esperantajn semojn, por instrui la lingvon kaj vekti por ĝi intereson kiel eble plej grandan.

Bonegan propagandon por Esperanto prezentas diverstemaj prelegoj en nia lingvo, tradukataj por la vasta publiko en la lingvor. nacian. La personoj, kiuj venas aŭskulti paroladon pri tiu aŭ alia temo, eĉ ne rimarkas, kiel oni verŝas el iliajn animojn la esperantan „venenon“.

Tion ĉi ni decidis en Romans — kaj la lokaj gazetoj anoncis prelegon pri Polujo, kun lumbildoj kaj popolaj melodioj. Homoj venis grandnombre.

Kaj ili aŭskultis pri tiu lando, por ili preskaŭ egzotika, pri ĝiaj dornoj kaj rozoj, pri la tataroj, svedoj kaj turkoj, pri la „ĉevaletoj“ de Zwierzyniec, pri la legenda filikfloro, pri la malnovaj „kulikoj“, pri la kutimoj kristnaskaj kaj paskaj k. t. p.

Ili aŭskultis kun simpatio kaj intereso, sed tiuj impresoj ne ĉe ĉiuj estis egalaj. Jen tie, en la tria vico, virino, kiu ŝajnas gluti ĉiun vorton de la tradukanto, aŭ, pli ĝuste, travivi ĝin. Tie, en la mezo, sidas viro, juĝante laŭ la aspekto, simpla laboristo, kaj aŭskultas kun stranga melankolio kaj for, en la fundo de la ĉambro, iu, laŭvide intelektulo, ridetas sopire.

Kiam antaŭ unu jaro mi ekvojaĝis al Svedujo, la Ministerio de la Eksterlandaj Aferoj disponigis al mi belajn lumbildojn. Tiuj lumbildoj plaĉis egale en Gefle kaj en Tarare, en Ockelbö kaj en Belforto, en Stokholmo kaj en Ljono, kaj nun la publiko de Romans rigardis la vidaĵojn el Krakovo kaj Varsovio, tipojn el Łowicz kaj el Tatroj.

Poste sekvis muziko. Gramofonajn diskojn ekturnis bonega aparato. Unue — marŝo el la napoleona epoko, kiun kantis la legioj de Dąbrowski, batalantaj por Napoleono en Italujo — kaj kiu poste iĝis pola nacia himno. La publiko staras. Poste ŝprucis el la aparato ĥorkante la kristnaska melodio „Di' naskiĝas...“

La virino el la tria vico aŭskultas kun ravo en la vizaĝo, kaj ŝiaj palpebroj ruĝiĝas, ekbrilas larme la okuloj.

La tradukanto anoncis mazurkon. Generala „aaa!“ elŝiris sin el la brustoj de la ĉeestantoj, kaj, kvazaŭ ili havus polan sangon en la vej-

noj, apenaŭ ili povis sidi trankvile, kiam eksonis la populara kanto:

„Kun batil' ĉe zono iras Maciek voje...”

La laboristo en la mezo mallevis la kapon tiel, ke oni ne vidas lian, vizaĝon. Pli rapide spiras la virino. La intelektulo en la fundo de la ĉambro apogis la fruntojn sur la fingroj, kiam eksonis revema kujavia melodio...

Fine, ĉe la ĝenerala bedaŭroplena „ooo!!” de la publiko la tradukanto anoncas la lastan diskon, popularan krakovan melodion.

Poste ekaplaŭdis kaj ebruis la homoj, levigantaj de siaj lokoj. Plaĉis. Plaĉis la moroj kaj kutimoj, plaĉis la vidaĵoj, plaĉis la vidaĵoj, plaĉis melodioj.

Mi estas okupita per la enpakado de la lumbildoj. Subite ekstaras antaŭ mi la virino el la tria vico. Ŝi rigardas min momente, hezitas ti-meme, poste demandas malkuraĝe en la pola lingvo: „Fraŭlino... vi estas el Polujo?”

Ŝi ĝojas evidente, ricevinte la jesan respondon. Per simplaj vortoj, en kiuj jam trabrikas la franca akcento, ŝi dankas por tiu prelego, kiu estis por ŝi kvazau eĥo el la malproksima patrujo. Ŝi estas ĉi tie, en Francujo, jam de 7 jaroj. Ŝi edzigis francon, ne revenos en Polujon...

„Mi ploris, aŭdante tiujn kantojn” — ŝi konfesas.

„Certe — diras la laboristo, kiu ankaŭ dume aperis apud ni — ĉar se iu ne havas koron, tiam... Sed se oni havas koron...”

Kaj li rakontas, kiel li tra legis en la gazetoj, ke okazos prelego pri Polujo, kiel li komence eĉ ne kredis, kiel tiu novaĵo fine kaptis lin...

„Kaj hodiaŭ mi rondiris ĉi tie jam de la tagmezo” — li finas, kaj parolas en simpla maniero pri la ĝojo, kiun li havis.

Fine ili ambaŭ adiaŭas min kaj foriras. Foriras ankaŭ mi kun miaj lumbildoj kaj diskoj.

Post semajno mi forlasos Romans; en alia loko ĉi min atendas. Kaj kiu scias, se en tiu alia loko ankaŭ la gazetoj anoncos prelegon pri Polujo, eble alia homo denove rondiros dum horoj ĉirkaŭ la prelegejo, por kapti la eĥojn el la malproksima patrujo... Lidja Zamenhof.

I. ESPERANTA SEMAJNO EN KRAKÓW.

Laŭ la propono de P. E. D. okazos en Kraków la 16—22 de oktobro 1933 I. Esperanta Semajno (I. Tydzień propagandy języka międzynarodowego Esperanto).

La „Semajno” okazos sub la protektado de Prezidanto de la Urbo Kraków, Dro Mieczysław Kaplicki.

Honoran Komitaton bonvolis eniri: Red. Dr. Beaupré Antoni, Dro Belmont Leo, Red. Dr. Berkelhammer Wilhelm, Inĝ. Bobkowski Aleksander, Direktoro de P. K. P., Prof. Dr. Odo Bujwid, Prof. dro Dąbrowski, Deputito Dro Marjan Dąbrowski, Konsulo Inĝ. Ludwik Dyduch, Epstein Tadeusz, Prezidanto de Komerca kaj Industria Ĉambro, Red. Dr. Flach Józef, Dro Greger Józef, Prezidanto de Financa Ĉambro, Red. Józef Gotlieb, Red. Hecker Emil, Kolonelo dro Kappel, Prof. Dr. Krzyżanowski Adam, Pastro Masny Jan, Gen. Dro Mond Bernard, Kuratoro Dro Nowicki Eustachy, Dro Piotrowski Tadeusz, Dir. Przybylska Zofja, Prof. Dr. Uaubenschlag Rafał, Deputito Dro Thon Ozjasz, Inĝ. Eugenjusz Tor, Direktoro de Industria Muzeo, Prof. Dr. Wilkosz Witold, Bronisław Winiarz, Direktoro de Pola Radio, K. Zieliński, Direktoro de YMCA.

Al Esperantista Konsilanta Komitato oni invitis s-anojn: Józef Alfus, Dr. Maksymilian Blasberg, Prof. Dr. O. Bujwid, Prof. Tadeusz Biliński, Dr. Leopold Dreher, Lektoro Tadeusz Hodakowski, Jadwiga Kostecka, Dyr. Inż. Edward Kostecki, Dr. Leon Rosenstock, Marja Sopińska, Inĝ. Jerzy Sowiński, Józef Toczyski, Katarzyna Torowa, Dir. Inĝ. E. Tor, Marja Szczepańska, Regina

disponas kelkajn, au eĉ dekkelkajn havenojn, superantajn laŭgrade la polajn havenojn (ekz. Germanujo kuu loĝantaro de 60 milionoj posedas por sia dispono 17 havenojn).

Karakteriza por la disvolva dinamiko de la havenoj en Polujo estas la fakto, ke dum en havenoj de aliaj landoj en periodo de nuna ekonomia deprimateco sekvas rimarkinda malpliigo de varspezoj (ekz. Germanujo), en Danzig nur lastjare sekvis sensignifa malgrandigo de spezoj, kaj en Gdynia la spezo eĉ plialtiĝis.

En tia stato de la aferoj ne estas direble, kvazaŭ la disvolvo de la haveno en Gdynia kontribuas al ekonomia ruino de Danzig. Malgraŭ la ekzisto de la haveno en Gdynia, la nombroj de spezoj en la Danziga haveno ne malgrandiĝas, sed ili ĉiam 4-oble superas la antaŭmilitan nivelon. Ĉar estas tute sendube, ke al Polujo estas necesa same la unu kiel la alia haveno, por ke ĝia ekonomia organismo povu libere spiradi kaj deĉe disvolvi sian ekonomian ekspansion. Oni devas konstati, ke ekzistas objektivaj kondiĉoj por prospera paralela disvolvo de la havenoj en Danzig kaj Gdynia.

Sub influo de politikaj instigoj, inspirataj de Berlin, Danzig tute ne klopodas grandiĝi sian bonstaton. Esplorante atente disvolvon de politikaj kaj ekonomiaj rilatoj en Danzig, malgraŭvole ekestas pravigebla preteksto, ke politikaj sferoj en Danzig faras ĉion, por kaŭzi ruinojn kaj ekonomian katastrofon de la Libera Urbo kaj atribui ĝin al Polujo por krei ŝajnkaŭzon al kunligo de Danzig kun la Germana Stato. Sennombrajn pruvojn, ke Danzig kondukas tian neantaŭvideblan ensiajn sekvojn polikon, povas al ni havigi mallonga analizo de la financa politiko de la Libera Urbo Danzig. La financoj de la Libera Urbo kvarfoje estis esplorobjekto de Financkomitato de Ligo de Nacioj, okaze de Danziga resaniga pruntepreno. La unuan formuligon de proponoj, prikalkulitaj por efektiviĝi la financan resanigon de Danzig, prezentis en 1926 j. Janssen, delegito de la Financa Komitato en la Ligo de Nacioj. Esplorinte la financan situacion de Danzig, Janssen postulis por malgrandigi elspezojn: 1) redukti oficistaron, pro tro granda ŝvelo de la administra aparato, 2) malaltigi salajrojn (kiuj estis fiksitaj meznombro je 10% pli alte ol en Germanujo), 3) ŝanĝi la sistemon de sociaj helpoj,

ESSENCO DE LA DANZIGA PROBLEMO.

KELKAJ NOTOJ HISTORI-EKONOMIAJ.

La komencita siatempe sur la kolonoj de Heroldo de Esperanto (n-roj 5, 9, 21, el 1932 j.) diskuto pri la Problemo Danzig—Gdynia ne povis esti tie finita. Pri la kaŭzoj vi povas ekscii el nro 11/1932 de Pola Esperantisto. Meze de la nuna jaro aperis anonima broŝuro: „Pri Danzig (Vojoj al paco kaj interkompreniĝo?)“. Ĉi-sube oni povos trovi respondon je la tuŝitaj tie proponoj.

Postmilita politika literaturo abundas je multaj publikajoj pri la Danziga problemo. Bedaŭrinde, ne ĉiuj publicistoj kaj politikistoj klopodas esplori ĝisfunde kaj objektivite la problemon de Polo-Danzigaj rilatoj. Plejparte tio farigas tiel, ke multaj publikajoj jam en antaŭvorto mem vidigas sian tendencan aprioran sintenon. Falsa klarigo de historia materialo, de nuna fakta stato kaj troigado de tute ne esencaj faktoj aŭ kvereloj polodanzigaj estas ĉiam sur la tagordo. Guste al tiuspecaj publicistaj produktajoj oni devas envicigi la broŝuron s. t. „Kion ni devas scii pri Danzig“ - vojo al paco kaj interkompreno“.

Aŭtoro de la artikolo, tute aliigante la faktojn, prezentis al sia leganto rilatojn, regantojn en Danzig, kvazaŭ speciale intence en kurba spegulo. Ne observante precizecon kaj ne konservante ian elementan proporcion inter gravaj problemoj kaj etaj aferoj, la aŭtoro de la artikolo, analizante la politik-ekonomian situacion en Danzig, tute malĝuste konkludas, konformigante sin al la politika kontraŭpola tendenco, evidenta de la unua ĝis la lasta vorto de la artikolo. Diritaj kurage, kaj senigitaj de ĉia objektiva argumentado, la asertoj de

la aŭtoro ne povas resti sen respondo. Ne estas eble pritrakti ĉiujn asertojn, el kiuj kelkaj pekas aŭ per kompleta malscio pri la problemo, aŭ per klare videbla tendenco. Krome, la limitaj kadroj de ĉi tiu artikolo ne permesas pli vaste disvolvi la temon.

La aŭtoro de la menciita artikolo sur unua loko starigas aserton, ke kreintoj de la Versajla packontrakto faris unu el plej grandaj eraroj, transformante Danzigon je libera urbo. Li asertas, ke kreintoj de la kontrakto ne devis preterpasi al tagordo la okazintajn ŝanĝojn en politiko-ekonomia vivo de Danzig, restarigante ĝin al tiu stato, kiu ekzistis antaŭ jarcentoj. Plue, ni legas en la priparolata artikolo kun plej granda miro, kvazaŭ Polujo nenian havis liberan maraliron, eĉ tiam, kiam Polujon ligis kun Danzig persona unio. Laŭ aserto de la aŭtoro, poloj ricevis en Danzig rajtojn, kiujn en pasinteco ili tie neniam posedis.

El ĉi supra ĉapitro ni vidas, kiel malprecizaj estas la historiaj notoj de la aŭtoro.

Antaŭe Danziganoj, kiuj bonege konsciis pri tio, ke florigo kaj prospero de ilia urbo dependas ekskluzive de ekonomia kunlaboro kun Polujo kaj de sinapogo je la vasta pola translando, prezentadis ne unufoje pruvojn de sia simdonemo al la Pola Stato, konservante por ĝi fidelecon en krizaj historiaj momentoj, kiujn travivadis Pola Respubliko. Unu el plej elokventaj atestoj pri la forta ligo, kiu ekzistis inter Polujo kaj Danzig, ni trovas en priskribo de grandiozaj solenoj, kiuj havis lokon en Danzig en j. 1754 kaŭze de 300-jara kunigo de Danzig kun Pola Respubliko. Eminentaj Danzigano, Gottlieb Wernsdorff diris al siaj samlandanoj la 27. II. 1754 jenajn vortojn: „Via libereco, viaj privilegioj, viaj legoj, propraĵo, havaĵo, preĝejoj kaj via kaj de viaj familioj sekureco estas donacitaj al vi kaj konservitaj dank' al polaj reĝoj. Vi havus nenion el tio, se via urbo trovigus sub estrado de tiuj, kies jugon devis longe toleri niaj antaŭuloj, kaj kiuj per siaj rabadoj, maljustaĵoj kaj masakroj turmentis nian landon. Felice pasas jam tri jarcentoj, de post kiam estas rompita la krueleco de kurdordenanoj kaj estigita la milda regado de polaj reĝoj.”

Kaj kiom alie rilatigis sin Danziganoj al prusaj reĝoj? Frideriko II. penadis diversmaniere akiri Danzi-

for de la teritorio de Libera Urbo Danzig de komercistaro, kiu transportas sian agadon al lokoj, kie ne ekzistas atmosfero de forta politika streĉo, kiel en Danzig.

En serio de riproĉoj, farataj al Polujo de la Danzigaj faktoroj, sur unuan lokon elpaŝas la afero de la haveno en Gdynia. Por povi ĝuste pritaksi la Gdynia'n demandon, o'ri devas turni sin al ĝia genezo. Jam en la j. 1920 Polujo havis okazon akre eksenti la kontraŭpolan politikon de Danzig, kaj tio farigis en kriza por Polujo momento, kiam la rugarmeo senpere minacis Varŝavon. En tiu tempo Danzigaj laboristoj rifuzis elŝipi municion kaj armilaron, destinitan por la pola armeo. La Danzigaj aŭtoritatoj estis tiam aŭ senfortaj, aŭ eble ne sufiĉe energie intervenis. Estu kiel ajn, sed la haveno, kiu estis certigorta al Polujo maraliron, ne plenumis sian taskon. Jen tiam Polujo projektis konstrui propran havenon. Plua kuro de rilatoj Pol-Danzigaj devis, kompreneble, firmigi Polujon en tiu decido, kiu estas efektivigita en formo de funkcia hodiaŭ grand-skale - haveno en Gdynia.

Politikistoj kaj publicistoj Danzigaj kaj germanaj malprave konkludas el la fakto de ekzistado de Gdynia kaj de ne renkontata en mondhistorio disvolvo de la Gdynia-haveno. La ekesto de Gdynia ne minacas la Danzigan havenon laŭ la ekonomia vidpunkto. Polujo, lando je grandaj demografiaj ebloj, nombranta jam nun pli ol 32 milionan loĝantaron, povas sukcese laborigi ambaŭ havenojn, precipe, se oni prikonsideros, ke la alianda komerco en Polujo troviĝas kelkriate en komenca stadio. La kiomo da varŝanĝo po homkapo en Polujo estas nun multe pli malalta, ol en aliaj landoj de Eŭropo. Paralele do kun plua ekonomia disvolvo de la lando ankaŭ grandigados rimarkinde komerca trafiko, direktata al havenoj en Gdynia kaj Danzig. Funkcigita nunjare fervoja linio liganta kun la pola marbordo tiel gravan industrian centron, kia estas Supra Silezio, sendube kontribuos intensigi varspezon en polaj havenoj. Pligrandigo de fervoja reto en orienta Polujo vidigos novajn valorojn, kiuj serĉas elfluon sur la mondon pere de polaj havenoj. Pro tiuj kondiĉoj desegniĝas helkoloraj perspektivoj por estonteco de ambaŭ havenoj. Por komparaj celoj indas menci, ke aliaj landoj, kies loĝantoro ne tre multe superas tiun de Polujo,

Responde je tiu ĉi riproĉo oni devas konstati, ke ankaŭ en la germanaj havenoj tiuspecaj sendaĵoj faras grandan procenton de ĝeneralaj varspezoj, ekz. en Stettin 48%, en Hamburgo 46%. Tiu riproĉo en proksima venonteco entute perdos ĉian aktualecon, ĉar en pola eksporto fariĝas ŝanĝo, konsistanta en tio, ke laŭgrade grandigas eksporto de produktaĵoj pli finitaj, kaj malgrandigas eksporto de krudaĵoj en primitiva formo.

Profitoj, kiujn ĉerpas la Danziga haveno el la im — kaj eksporto de grandvolumenaj varoj (karbo, ferminajo, ligno, fero) estas — malgraŭ la starigata riproĉo — tre rimarkindaj: S-ro Dobrzycki, prezidanto de la Danziga fervojdirekcio en speciala studaĵo, dediĉita al la disvolvado de la Danziga haveno, prikalkulis, ke meznombre en jaroj 1927—1930 Danzig gajnis pro la spezo de la nomitaj varoj 19,393,000 Danzigajn guldenojn ĉiujare. Grandiĝo de varspezoj en la haveno kompreneble favore influas la nombron de okupitaj laboristoj, kio ne estas sensignifa por la labormarkato.

Nepravigebla estas ankaŭ la riproĉo ne unufoje farata al Polujo, ke ĝi ne faras investojn en Danzig. Sur fundamento de aŭtentikaj datoj oni devas konstati, ke Polujo ĝis fino de 1930 j. faris en la Danziga haveno investojn je la sumo de 57 milionoj da zlotoj. Ankaŭ la Havena Konsilantaro kompletigis la havenajn instalaĵojn ek-de la j. 1926 per sumo de 28 milionoj da Danzigaj guldenoj. Komparo de aranĝoj kaj de teknika aparataro en la Danziga haveno al la antaŭmilita stato, montras la atingitan grandan progreson en tiu sfero.

La ekonomia vivo de la Libera Urbo Danzig sendube atingus pli grandan swingforton, se Danzig ne permesus sin direkti per politikaj aferoj, kaj prefere klopodus vigligi la ekonomian kunlaboron inter Polujo kaj Danzig.

Konformigante sin al politikaj instrukcioj trudataj al ĝi el Berlin, Danzig iris en tute kontraŭa direkto. Kaŭze de sia politiko malfaciligis al Polujo ekspluati la havenon, kaj al polaj civitanoj ĉe fondado de novaj komercaj postenoj kaj de laborejoj sur teritorio de Libera Urbo Danzig, devas Danzig — ja tute nature — suferi kelkajn konsekvencojn de ekonomia speco. Precipe lastatempe, kiam ekkreskis sur la teritorio de Danzig rimarkindaj influoj de hitleranoj, estas videbla defluc

gon. Tamen tiu urbo restis fidela al Polujo. Ne ricevinte Danzigon post unua dispartigo de Polujo (1772 j.), Frideriko II decidis alkonduki Danzigon al kompleta ekonomia ruino, per aplikado de diversaj ĉikanoj ekonomiaj. Li atingis sian intencon per alta impostado al ŝipoj venantaj Danzigan havenon. La nombro de ŝipoj, sumiganta en j. 1770 per 1988, malgrandiĝis pro tiu ordono en 1774 j. ĝis 533, kaj en 1782 ĝis 145. Honorata per ĝenerala estimo Danziga patriciino, eminenta poetino, kaj patrino de la fama germana filozofo J. Schopenhauer, tiel diris pri tiu ĉi politiko: „La prusa reĝo jetis sin kiel vampiro sur la malfeliĉan urbon kaj elŝuĉis ĝiajn sukcojn“. Frideriko II tamen ne sukcesis realigi sian planon. Lian verkon finis Frideriko Vilhelmo II dum la dua dispartigo de Polujo. Tamen la loĝantaro de Danzig kun armilo en manoj kontraŭstaris la enmarŝantan prusan soldataron.

Laŭ la packontrakto en Tilsitz oni restarigis al Danzig la iaman karakteron de libera urbo, kiu tamen estis apartiga for de Polujo per ne natura prusa koridoro. En tiaj cirkonstancoj la ekonomia situacio de Danzig ne povis esti prospera. Do ne estas mirinde, ke la urbo celis ree kuniĝi ekonomie kun Polujo. Kiam en j. 1813, post malvenko de Napoleono estis preparataj novaj ŝanĝoj de politikaj limoj en Eŭropo, estis prilaborita la 8 de januaro 1813 j. fare de komisiono el 5 Danzigaj senatoroj — Weichmann, Wernsdorff, Döring, Trendelenburg kaj Sörmans — sekreta instrukcio por Dr. Keidel, delegito de la Libera Urbo Danzig ĉe la registaro en Parizo. Tiu ĉi instrukcio tute ekskludis revenon de Danzig sub la prusan regadon, opiniante tian eventualaĵon „la plej granda kaj ne akceptebla malbono“. La instrukcion fermis la konkludo: „ke la plej bona solvo estus aligo de Danzig al Polujo — ŝtato forta kaj sendependa“. Bedaŭrinde, la Vien'a kongreso en 1815 j. efektivigis novan dividon al Polujo.

Malnovaj, tradiciaj simpatioj de Danzig vekigis por Polujo eĉ en periodo de la politika mallibereco, nome dum pola ribelo en rusa Polujo en 1863 j. Manifestadoj de Danziganoj esprimigis en protesto kontraŭ anti-pola politiko, kulturata de Prusujo.

Tiuj historiaj faktoj atestas pri tio, ke aŭtoroj de la Versajja packontrakto ne enkondukis grandajn novaĵojn, decidante fari Danzigon libera urbo kaj disponigante ĝin al Polujo. Ili revenis al historia tradicio kaj al geo-politika realeco, kiujn ne povis forviŝi unu kaj duona jarcentoj de fremda regado. Nur en lumo de ĉi tiuj historiaj faktoj oni povas jen kompreni, kiel la malnovaj Danzigaj patricioj, rezonante per ekonomiaj kategorioj, konsciis bonege pri komuneco de interesoj, ligantaj Danzigon kun Polujo. Per tio kompreniĝis ilia polonofilismo.

Oni devas supozi, ke tiaj konsideradoj sufiĉe klare refutas laŭ la historia vidpunkto la tezon de la preparolata artikolo, asertanta, ke kreo de Libera Urbo Danzig estis unu el plej grandaj eraroj de la Versajja packontrakto.

Ni komencu nun analizi tiujn aserton kaj riproĉon laŭ la ekonomia vidpunkto. Ĉar la aŭtoro konstatas, ke konsekvencoj de kreo de Libera Urbo Danzig surpremiĝas precipe fatale sur ekonomiaj cirkonstancoj kaj entute starigas la ekonomian vivon de Danzig sub signo de demando.

Do al analizo de ekonomiaj cirkonstancoj, regantaj en Danzig, ni devas dediĉi iom pli multe da loko.

Danzig sub prusa regado, apartigita de sia natura translando, kiu escepte de Pomeranio kaj Poznan'a provinco, trovigis en sfero de ekonomiaj influoj de Rusujo kaj Aŭstrio, ludis en Germanujo rolon de provinca haveno kun triagrada signifo. Grandioza floriĝo de Danzig en tempoj de ĝia ligiteco kun Polujo estis perforte haltigata. Indas ĉe-okaze menciit, ke en j. 1454 Danzig posedis 30.000 loĝantojn, kaj tri jarcentojn poste, t. e. en periodo de ekonomia kunlaboro kun Polujo — la nombro de la loĝantaro altiĝis ĝis 77.000. En tiu tempo Danzig estis la plej multe loĝata urbo en centra Eŭropo. Hamburgo atingis tioman loĝantaron unu jarcenton poste. Kaj Danzig enigita al ekonomia organismo de Germanujo — kaj senigita je sia natura translando — estis antaŭirata post paso de ia tempo, de la haveno de Stettin. En la j. 1880 varaj spezoj de tiuj du havenoj estis preskaŭ egalaj rilate grandecon, balanciĝante en limoj de 1.2 milionoj da

tunoj. En j. 1900 la varspezo en Stettin kreskis ĝis 3.28 milionoj da tunoj, kaj en Danzig ĝi nombris apenaŭ 1.5 milionojn da tunoj. Fine en j. 1913 la varspezo en la Stettina haveno atingis sumon de 6.2 milionoj da tunoj, kaj en Danzig 2.1 milionoj da tunoj. Do kiel videbligas el ĉi supra komparo, la haveno en Danzig ne estis antaŭ la milito objekto de speciala zorgo kaj protekto flanke de la germana ŝtato.

Post la mondmilito, kiam Danzig estis enigata en doganan teritorion de Polujo, komenciĝas por ĝi nova erao de floriĝo. La malnova haveno, ludanta apenaŭ triagradan signifon, dronanta en kompleta stagno, komencas reviviĝi kaj baldaŭ ĝi ekokupas inter la baltaj havenoj duan lokon post Stockholm. Pri la disvolvigo de la haveno atestas sekvaj nombroj, montrantaj grandegan kreskon de la trafiko kompare al la antaŭmilita periodo.

Jaro 1913	2,111,000 tunoj
" 1928	8,615,000 "
" 1929	8,560,000 "
" 1930	8,213,000 "
" 1931	8,330,000 "

Revenante al la supre farita komparo pri la haveno en Stettin, ni vidas tute alian bildon de rilatoj. En la sama tempo, kiam Danzig entras periodon de nova disvolvo, en germanaj havenoj ĉe Balta maro komenciĝas epoko de dekadenco. La haveno en Stettin montras en la sama tempo sekvajn nombrojn de varspezoj:

Jaro 1913	6,246,000 tunoj
" 1928	4,597,000 "
" 1929	4,919,000 "
" 1930	4,888,000 "
" 1931	3,763,000 "

La okultropa disvolvo de la Danziga haveno pikis okulojn de publicistoj kaj politikistoj germanaj, kiuj, volante malgrandigi ĝian signifon, rezonas, ke la varspezo havas nenion komunan kun efektiva ekonomia disvolvo de Libera Urbo Danzig, ĉar la varspezon en la Danziga haveno laŭdire konsistigas plejparte grandvolumentaj, malmult-valoraj varsendaĵoj, kiel: fermmaĵoj, karbo, ligno ktp.

Weinsberzanka, Ignacy Wiesenberger, Red. Dr. Maksymiljan Ziomek.

En **Ekzekutiva Komitato** laboras s-anoj: Bertizanka Hermina, Lektoro Hodakowski Tadeusz, Kostecka Krystyna, Kriss Juljusz, Kutscher Ludwik, Lichtenstein Eugenjusz, Neubergowa Julja, Ortsman Juljusz, Srebrna Luiza, Szczepańska Irena, Zajączkowski Zygmunt.

La laboron oni dividis en 3 partoj **I. Propaganda**. Nome propagando pe.: a) broŝuro (16 paĝa, senpaĝa kun reklamoj), b) afiŝoj, c) prelegoj en ĉiuj gimnazioj, d) kinejoj, e) gazetaro, f) vitrinoj de librovendejoj kun Esperantaj libroj, g) en transparentoj.

II. Aranga: Tie apartenas: a) Akademio, b) Revuo, c) Koncerto, d) Dancespero, e) Lotumado.

III. Porlingva: a) Lektorado en universitato, b) kursoj en lernejoj, c) publika kurso kun provleciono.

Tiel aspektas la preparoj. Kiel tio aspektos en praktiko — ni vidos.

Eli.



F I L M O



ESPERANTO EN TONFILMO.

En la lasta numero ni menciis pri la filmigo de Ce-kurso en Esperanta Domo en Arnhem. Nun ni kun ĝojo povas niajn legantojn informi pri nova esperantista tonfilmeto. Nome por la tonfilmo de skolta mondtendaro oni kaptis in. a. ankaŭ scenon kun esperantistaj skoltoj. Kvankam la tuta sceno daŭras nur kelkajn minutojn, sed oni bone vidas unue diversnaciajn skoltojn, kiuj en propra lingvo diras, el kiu lando ili venis, al jamboreo, poste P. Balkanyi, reprezentanto de Skolta Esperantista Ligo diras antaŭ tuta grupo ke ili ĉiuj komprenas unu la alian per Esperanto. Dum liaj vortoj oni disvolvas verdstelan flagon de SEL, kunportitan el Anglujo.

Tiun-ĉi skoltan filmon kun esperantista sceno ni esperas vidi ankaŭ en Polujo.

Eli.

ĈU VI SCIAS, KE...

...La hungara gazeto „Uj Nemzedék” informas pri finpretiĝo de unua Esperanto — tonfilmo kun Marion Marsch. La aŭtentikeco de tiu-ĉi informo estas tre dubinda.

...Produktejo „Blok” preparas filmon kun socia temo laŭ scenaro de s-ino Morozowicz — Szczepkowska, aŭtorino de la fama dramo „Afero de Monika”. Ĉefan rolon ludas Jadwiga Andrzejewska.

...Duan filmon kun Socia temo turnas reĝ. Michał Waszyński. Ĝia titolo estos „Lulu”.

...La sama reĝisoro projektas turni filmon laŭ romano de Tadeusz Dołęga Mostowicz s. t. „Prokuroro Alicja Horn”.

...„Alvaginto” estas tilolo de la filmo turnita en Huculujo (sudorienta parto de Polujo) Reĝisoras S-ro Jan Nowina Przybylski. En ĉefaj roloj: Stanisław Sielański, Ina Benita, Zbigniew Stankiewicz.

...Nova montana filmo de Adam Krzeptowski havas titolon: „Agonianta eĥo”. La filmo havas sensacian karakteron, sed enhavos ankaŭ humorajn momentojn dank’ al konata komikulo Sielański.

...Sensacia filmo estas ankaŭ „Afero de Kristina”. Reĝisoras S-ro Tadeusz Chrzanowski, en ĉefa rolo Lili Zielińska.

Eli.



SPORTO KAJ TURISMO.



Esperanto Kunigas la tutmondan turistaron.

La turismo en la postmilita tempo fariĝis ĝenerala bono, kaj ĉiujare pli kaj pli disvolviĝas; la turismo okupas nun gravan lokon en la mondo.

Ni migradas en la lando, veturas eksterlanden, de diversaj landoj venas al ni fluo de fremdaj turistoj. Favora cirkonstanco por la turismo estas la plibonigitaj vojaĝ-rimedo kaj ĝia tekniko. La krizaj tempoj kaŭzis malkariĝon de la

vojaĝelspezoj. La rabatoj kaj favoraj prezoj por turismaj vojaĝoj instigas eluzi la liberan tempon por ekskursi, vojaĝi. En tiaj cirkonstancoj eĉ por la malmulta, ŝparita mono, ĉe bona organizo oni povas ĝui la vojaĝon tra nekonataj regionoj. En la vojaĝo estas necesa scio de fremdaj lingvoj, sed ĉu estas eble, ke la vojaĝanto sciu tiom da lingvoj por ĉie povi interkompreniĝi. Des pli la fremdlanda turisto, venanta al ni. Kion valoras la internaciaj renkontiĝoj, kaj precipe turismo se manko de parolo senigas nin de la ebleco interkompreniĝi. La scio de unu lingvo malfermas al ni nur unu parteton de la mondo. Kaj pro tio la facila helpa internacia lingvo Esperanto donas al ni la eblecon forigi malfacilaĵojn en la interkompreniĝo kun divers-naciaj kaj — lingvaj popoloj. Pro tio ankaŭ la turisto-esperantisto havas antaŭ si gravan taskon. Esperanto povas kaj devas ludi gravan rolon en la internacia turismo kiu disvolviĝas pli kaj pli. Esperantistoj-turistoj volonte helpas kaj akceptas alilandajn samideanojn kaj servas al ili ĉiam kaj ĉie. Sed tio estas laboro kiun oni devas gvidi senĉese kaj organizi laŭplane kaj konsekvente. Esperanto multe helpas, en la turismo — preskaŭ ĉie eksterlande, en la ekspozicioj en turismaj oficejoj oni povas ricevi gvidlibrojn kaj broŝurojn kun klarigoj en Esperanta lingvo.

Ni devas paŝi antaŭen kune kun la tuta civilizita mondo, kaj uzi Esperanton, tiom pli, ke Polujo estas la lulilo de Esperanto.

Se ĉiu turisto scius Esperanton, tiam ekzistus internacia turismo, ĉar sen komuna por ĉiu komprenebla lingvo, la turismo ne atingos le celon. Ni veturu, migradu por ripozi, pro novaj impresoj, kaj ĉie ni uzu Esperanton: ĝi malfermas al ni la mondon kaj tial ĉiu turisto devas lerni la neŭtralan, helpan internacian lingvon, se ni vere deziras fariĝi frato al la fremdlanda turisto, kaj kunhelpi al la granda, belega ideo de interfratiĝo.

Oskar Berman.

TURISMA PROPAGANDO PER ESPERANTO.

Kiel oni scias, en aŭgusto 1931, okaze de II Internacia Postkongreso Esp. en Białystok, Turisma Servo de UEA aperigis kun financa subteno de białystoka magistrato 8-paĝan „Gvidilon tra Białystok”. Ĝi aperis en 10.000 ekz., el kiuj 2.000 estis dissenditaj de la C. O. de UEA en Genevo por fari turisman propagandon por Białystok.

Sekve de recenzaj notoj en la Esp. gazetaro la białystoka magistrato daŭre ricevas petojn pri alsendo de tiu gvidilo. Tiuj petoj estas plezure tuj plenumataj de la kulturkleriga fako de la magistrato. Plej multaj petoj venis el Japanujo.

Eksterlandaj samideanoj, kiuj ankoraŭ ne havas tiun, bele ilustritan, gvidilon, postulu ĝin per poŝtkarto de: Magistrato, kulturkleriga fako, Białystok, Polujo.

Nun Pola Landkonema Societo en Białystok aperigis ampleksan 148-paĝan polan gvidlibron tra Białystok. Ĝi enhavas ne nur mencion en la teksto pri la naskodomo de nia Majstro kaj informojn pri Dro Zamenhof kaj pri la Esperanta movado, sed ankaŭ 7-paĝan esperantlingvan resumon de la gvidlibro, faritan de Ĉefdelegito de UEA s-ro Ŝapiro laŭ komisiono de Turisma Servo de Universala Esperanto-Asocio. La prezo de la plaĉa libreto estas zl. 1.50. Ni rekomendas ĝian akiron al ĉiuj pollandaj gesamideanoj, kiel ankaŭ al niaj eksterlandaj amikoj. La administracio de nia gazeto volonte perados la mendojn.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

EKSTERLANDO.

Danujo. Antaŭ nelonge fondiĝis Dana Esperanto Instituto. Ĝia ĉefa celo estas venigi eksterlandajn Ĉe — metodajn instruistojn, organizi sisteman propagandon, eldoni propagandan materialon, k. t. p.

Egiptujo. La unua egipta deputito — esperantisto estas D-ro Raŝid Abdalla. Li promesis paroli en egipta parlamento pri la instruado de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj.

— La egipta poeto Ibn Hanzal en Sennuris Fayoum verkis arablingvan poemon pri Esperanto.

Hispanujo. Patronato Nacional del Turismo (Duque de Medinaceli, 2) en Madrid eldonis belegan 128 paĝan gvidlibron tra Santander.

Hungarujo. Dum aŭgusto vizitis Budapeston du esperantistaj karavanoj el Wien kaj Bratislava laŭ la aranĝo de „Literatura Mondo“.

La budapesta hotelo Continental enkondukis novan, imitindan servon. Nome: se iu esperantisto anoncas al hotelo sian alvenon kaj mendas ĉambron, la hotelo sendas pordiston aŭ serviston kun aŭtomobilo al la stacidomo, kiu atendas la alvenon ĉe la vagonaro, svingante esperantan flagon. Okaze de internaciaj festoj kaj kongresoj ankaŭ sur la domo de la hotelo flirtas Esperanta flago.

Norvegujo. Norvega Esperantista Ligo (NEL) en kunlaboro kun la tutlanda turisma oficejo de Norvegio aranĝos en la norvega ĉefurbo, Oslo, antaŭkongreson 1934. Detalajn sciigojn per esperanta broŝuro oni povas ricevi je la adreso: Translaget for Reiselivet, Norge, Oslo.

Portugalujo. La oficiala Touring Club de Portugal kreis esperantistan Sekcion, kiu gvidos de nun la propagandon en turismaj rondoj, eĉ en oficialaj.

Svedujo. La XIII SAT-Kongreson partoprenis 642 personoj el 16 landoj (venis 599), do belega sukceso. Kiel urbon de XIV-a SAT Kongreso oni elektis Valencion.

POLLANDO.

Białystok. Post interrompo la esp. Societo en nia urbo rekomencas sian agadon. La unua paŝo al tio estis ĝenerala kunveno okazinta la 5-an de k. m. La Kunveno elektis novan Komitaton por plua laboro, kiu konstruiĝis jene: Prez. S-ro J. Szapiro, Vicprez. S-ro V. Osowicki, Sekr. S-ro E. Jabłoński, Kasistino f-ino T. Perlis. Mastruma Komisiono: S-ro I. Kamiemiecki, f-ino R. Porozowska kaj f-ino D. Pełtinowicz; Bibliotekistino f-ino E. Pomeranc. Kandidatoj — S-roj Brawerman kaj Nasielski. La novelektita Komitato jam havis kunsidojn, dum kiuj ĝi faris planon pri la Esperanto-agado en nia urbo por la kuranta jaro. Vendrede la 13-an de k. m. okazis jam prelego de nia Prez. S-ro J. Szapiro s. t. „La XXV Esp. Kongreso de Esperanto en Kolonjo kaj la nova organizo de la Esperanto-Movado“. Tiu prelego estas komenco de pluj interesaj aranĝoj por la esperantistoj en Białystok dum la nunjara varb-sezono.

Kraków. Sendepende de la preparoj por I. Esperanta Semajno, okazis jenaj prelegoj aranĝitaj de Societo Esperanto: 11. septembro: Humoro ĉe diversaj nacioj — S-ano Ortsman, 18 septembro: Kion al mi instruis mia vojaĝo tra Eŭropo — S-ano Juan Martinez, hispana esperantisto, kiu revenante el SAT-Kongreso vizitis Krakovon kaj restis tie dum kelkaj tagoj, 25 septembro: Kiel organizi Esperanto — kursojn — S-ano Dro Leo Turno, 9. oktobro: Kiel efike propagandi dum I. E. Semajno-kolektiva prelego.

Krom tio okazis pollingva prelego de f-ino Irena Szczepańska pri Budapeŝto, aranĝita de P. E. Klubo.

◉◉◉ D I S T R A Ĵ O J ◉◉◉


II. ENIGMOKONKURSO.

Ni malfermas II. Enigmokonkurson, kies kondiĉojn ni prezentos en venonta numero.

La presitaj tie-ĉi enigmoj devenas el aperonta „Amuzaro“ de Dro Dreher.

ENIGMO NRO 1.

Kvadratvortenigmo.



Metu po unu literon en ĉiu kvadrateton tiel, ke oni povu legi samajn 4 vortojn de supre malsupren kaj de maldekstre dekstren.

La 4 vortoj signifas:

1. Ordi, forigi malpuraĵon,
2. Nevideblaĵo, kiu vivigas,
3. Fadensimila streko,
4. Karulo.

Ĉiuj vortoj estas apostrofitaj.

Pro solvo de tiu-ĉi enigmo ni alkalkulas 5 punktojn.

Enigmo nro 2.

Legu tion:

2 — 3 — 4 vendistoj.

Pro solvo de tiu-ĉi enigmo ni alkalkulas 2 punktojn.

RIDU IOM!**Proverba homo.**

- Cu vi scias, ke al ĉiu homo taŭgas ia proverbo?
- Tiel? Nu, mi estas scivola, kiu ekzemple taŭgas por mi?
- Por vi? Por vi taŭgos ekzemple jena: Al kiu Dio donis oficon, al tiu donis ankaŭ saĝecon.
- Sed mi ja havas nenian oficon...
- Nu, ĝuste...

En kafejo.

- Kelnero, viaj tagmanĝoj fariĝas ĉiutage pli malbonaj, sed tiu hodiaŭa aspektas kiel jam postmorgaŭa.

Nedivenkapabla.

- Kion vi dirus, fraŭlino, se mi vin nun kiskus?
- Tion mi povos al vi diri nur poste...

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.**

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Szapiro,
Marsz. Piłsudskiego 33, Białystok Konto ĉe PKO. Nro 60.047.
OFICIALA BULTENO Nro 27.

UNUECIGO DE LA ESPERANTO-MOVADO. Ni atentigas ĉiujn membrojn de nia Asocio, ke la **INTERKONSENTO**, subskribita de la Ekzekutiva Komitato de P. E. D. kaj de la Komitato de UEA, pri kiu ni informis en nia alvoko al pollanda Esperantistaro („Pola Esp.“ Nr. 7 — 1933 pĝ. 107), jam estas praktike aplikata. Intertempe estas ankaŭ subskribita t. n. „Interkonsento de Kolonjo“, fine realiganta la komunan deziron pri unuecigo de la Esperanto-movado. Denun UEA estas „la tutmonda organizajo Esperantista, reprezentanta la Esperanto-movadon kaj organizanta la universalajn kongresojn“.

„POLA ESPERANTISTO“. Sekve de la menciita **INTERKONSENTO** ni akceptas de ĉiuj UEA-membroj rabatitajn abonojn por „Pola Esperantisto“. Nun do, ne nur Membro-Abonantoj, sed eĉ Membroj kaj Helpmembroj de UEA rajtas ricevi „Polan Esperantiston“ por favora jarprezo de nur 5 zł. Mendojn akceptas lokaj Delegitoj kaj la Ĉefdelegito. Ne sendu rekte al la administracio de „Pola Esp“, ĉar ĝi ne akceptas rektajn, rabatitajn abonojn, ne povante kontroli, ĉu la mendanto estas membro de UEA.

Oni akceptas ankoraŭ abonmendojn por 1933.

NEREPAGINTOJ. Ĉiam ankoraŭ restas aro da nerepagintoj. Kelkaj simple forĝesis repagi sian kotizon, aliaj atendis la finordigon de la organiza demando. Nun, kiam la organiza demando estas plene solvita, menu havas kaŭzon por heziti pri realiĝo. Bonvolu do rapide repagi vian kotizon al la Delegito en via loko aŭ al la Ĉefdelegito. Tuj post ricevo de via kotizo estos ekspedata al vi la Jarlibro (448 paĝoj), dokumentoj kaj „Esperanto“. Ne forgesu noti vian membronumeron ĉe realiĝo.

PREMIOJ. Aro da membroj malgraŭ kelkfojaj demandoj ne indikis, kiun premion por frupago ili elektis. Ĉar ne estas eble plu atendi pro baldaŭa fino de la jaro, ili ricevas premion laŭ elekto de Centra Oficejo.

Novaj membroj rajtas ricevi premion, sendepende de tio, ĉu ili aliĝis en la komenco de la jaro, aŭ pli poste. Postulu liston de premioj ĉe via Delegito aŭ ĉe la Ĉefdelegito.

NOVA ASOCIA JARO. En Novembro ĉiuj ĝisnunaj membroj ricevos specialan Non de „Esperanto“ kun plenaj informoj pri la kondiĉoj de aliĝado en la jaro 1934. Ankaŭ ni sciigos detalojn en „Pola Esperantisto“.

Samideanoj, kiuj ĝis nun ne estis membroj de UEA kaj deziras ricevi la specialan Non de „Esperanto“, bonvolu jam nun sendi al la Ĉefdelegito sian adreson.

Specimenoj de „Esperanto“ kaj aliĝiloj por UEA estas volonte sendataj al ĉiu laŭ peto.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Oktobro n. j. UEA kalkulis en Polujo 286 membrojn (4 DM, 9 MD, 132 MA, 111 M, kaj 30 HM), krom tio 2 Esp. Entreprenojn.

NOVAJ DELEGITOJ estos starigitaj en aro da urboj. UEA havas membrojn en 109 urboj de Polujo. Estas nepre dezirinde, ke en ĉiu el tiuj lokoj estu Delegito. Kandidatoj bonvenu anonci vian pretecon al la Ĉefdelegito. Listo de novaj Delegitoj aperos en sekvonta Bulteno, publikigota en Novembra No de „Pola Esperantisto“

Białystok, la 1. 10 1932.

J. ŚAPIRO, Ĉefdelegito de UEA.

VI FORGESIS

repagi vian kotizon al UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO!

VI NE RICEVIS

tial la grandampleksan kaj interesenhavan JARLIBRON por la jaro 1933, la membrokarton, servokuponon, la gazeton „ESPERANTO“, ĉiumonate aperantan k. a.

LA KOTIZO ESTAS MALGRANDA:

Helpmembro pagas nur 3 zl. por la tuta jaro, Membro — 6 zl., Membro-Abonanto — 15 zl., Membro-Subtenanto, ricevanta specialajn libropremiojn — zl. 35.—.

PAGU DO TUJ

la kotizon laŭ unu el la ĉi-supraj kategorioj kaj

VI ĈION RICEVOS SENPROKRASTE.

La kotizojn akceptas kaj ĉiujn informojn volonte donas la lokaj Delegitoj de UEA en Polujo kaj la

Ĉefdelegito J. Śapiro, Marsz. Płsudskiego 33, Białystok.
(Konto ĉe PKO. No 60.047).

INTERESAJ SCIINDAĴOJ.

NOVAJ SUKCESOJ DE POLA ASTRONOMIO

La pola astronomio akiris lastatage novan sukceson sur internacia tereno.

Laŭ telegramoj alvenintaj el Ameriko — en unu el plej grandaj tieaj observatorioj (de Lick sur Mount Hamilton en Kalifornio) estas retrovita la 25-an de Junio la perioda kometo de Wolf I laŭ prikalkuloj de pola astronomo, prof. M. Kamiński. direktoro de varŝava observatorio, kiu depost pli ol 20 jaroj esplorsekvas per siaj prikalkuloj la kuron de tiu kometo kaj nun li antaŭmontris — kun eksterordinara en tiuj okazoj precizeco — la lokon sur la ĉielo, kie ĝi devis aperi post ok jaroj de malĉeesto.

La perioda kometo de Wolf I estas jam depost 49 jaroj konata kaj aperas nun la sepan fojon. Ĝi apartenas al la tiel nomata „familio“ de Jupitero, kies orbiton ĝi ĉe ĉiu ĉirkaŭkuro de suno tranĉas subigante ĉe tio de tempo al tempo al la „movmalhelpoj“ flanke de tiu grandega planedo. Tiuj malhelpoj, deformantaj atentige la vojon de la kometo, estas ĵus objekto de la esploroj de pola sciencisto. Ilia prikalkulo postulas tutajn jarojn da penegaj kaj komplikitaj kalkuloj. Ĉi - okaze la laboro estas kronita per rezulto lasanta nenion dezirebla. La atendata kometo surkovris per si precize la ĉielpunkton antaŭmontritan per la kalkulado.

Porkompare estas menciinde, ke antaŭ la esploroj de prof. Kamiński koncernantaj la moviron de kometo Wolf I kiel plej bone esplorita estis opiniata la kometo perioda de Encke, kiu komencante de la jaro 1819 ĉiujn 3, 33 jarojn revenadis regule al la suno, sed dum la lasta apero en 1931 ĝi videbliĝis en la ĉielpunkto distanca de la prikalkulita preskaŭ je 5 ŝajndiskoj de la luno.

La kometo de Wolf, ekvidita pere de unu el plej grandaj iloj de la mondo, prezentas sin nun kiel t. n. objekto de 18-a stelgrandeco. Ĝi vagmarŝas sur la fono de steloj kuŝantaj apudlime inter la stelaroj de saĝo kaj vulpo, videblaj nun oportune vespere.

ELEKTROFLUO EL LA FORNO.

Gravega eltrovo de pola inĝeniero.

Unu el varŝavaj elektroinĝenieroj pretigas modelon de la forno, kiu var-

migante la ĉambron (salonon aŭ atendejon) produktas samtempe elektrofluon por lumigado.

En la sfero de elektrotekniko estas tio plenega novaĵo. Ĉio igas esperi, ke la laboroj kaj penoj de nia landano alportos bonajn rezultojn.

La eltrono dolas la eblon ricevadi elektrolumon el seka termobaterio adaptita interne en la forno tute simila al ordinara kahelforno.

La kutina hejtado per ligno aŭ karbo eligas elektrofluon sufiĉan por lumigi tutan loĝejon. Tiu-ĉi forno havanta nenian komplikitan aranĝon, tute simpla por funkciigo, sen iaj moveblaj partoj, same sekura, kiel la ordinara forno, povas esti bonega fonto de elektra fluo.

Povas realiĝi la deziroj de multaj, kiuj malproksime de la elektroproduktejo ne havas fluon, ne volas instali motorojn kaj aliajn multekostajn aranĝaĵojn, dum kiam da hejtajo ili havas sufiĉon.

Transskribis J. Orzech.



Tiun ĉi bildon oni nun projekcias en Krakovaj kinejoj.

La kliŝoj por kinejoj de tiu-ĉi bildado estas riceveblaj ĉe „Societo Esperanto” Smoleńsk 9, Kraków po 4 zł. pro peco (kun la alsendo).

Foto: Eli.

Treege ĝojigan sciigon ni ricevis: La mondfama verko de Sienkiewicz, „Quo vadis?” en esperanta traduko de f-ino Lidja Zamenhof estas nun presata de Populara Esperanto - Biblioteko en Amsterdam. Ĝi estos en du volumoj. La unua aperos jam baldaŭ.

Finfine ni povas publikigi por la nuna jaro programon de Esp.-prelegoj en polaj radiostacioj.

25 oktobro. T. Hodakowski: Toruń kaj Kopernik.

8 novembro. B. Pochmarski: Dekkvinjaro de renaskiĝinta Polujo.

22 novembro. Dr. J. Dobrzycki: Kion signifas trumpetsignalo el la turo de Skt.-Maria preĝejo en Kraków.

13 decembro. Prof. Dr. J. Reiss: Fryderyk Chopin.

27 decembro. Z. Sobołta: Memhelpo de blinduloj en Polujo.

Ciuj prelegoj (krom la lasta) estos disaŭdigataj pere de stacioj en Kraków kaj Warszawa. La lasta estos parolata per Lwów kaj Warszawa.

Komenco de la prelegoj: 22 h. 10 m. Post 15-minuta prelego sekvas la „radiokesto”.

ADRESSANGO. Dr. Antoni Czubyński, Łask, Piłsudskiego 43.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) prenumerata roczna zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/8 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/3 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 84.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70. duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660

Drukarnia L. Gronusia i Ski, Kraków, ul. Stołarska 6.

Redaktor odpowiedzialny Juliusz Kriśa.

KU P O N O N-RO 1
POR
II ENIGMOKONKURSO.